**Bonvenon,**

**bonvenon,**

**karaj geamikoj!**

**Bonvenon,**

**bonvenon,**

**karaj geamikoj!**

# Ĉu Vi aŭdis tiun kanton?

Auskultu ĝin en http://ileiweb.extra.hu/portonovo.html

Afrikaj samideanoj eĉ kantante invitas Vin al

## La 41-a Konferenco de ILEI en Portonovo (Benino)
## 29 de julio – 05 de aŭgusto 2008

### *Instruistoj de Esperanto por la Planedo Tero*

**A**ŭdinte tiun ĉi kanton organizantoj de la konferenco decidis prokrasti daton de aldona krompago je 10% por malfruaj mendoj ĝis la 15ª de majo 2008 kaj tiel subteni sinceran deziron de afrikaj samideanoj ĝui pri plurkultura interkonatiĝo kaj interŝanĝo de spertoj en ilia kontinento.

### Rapidu aliĝi al al konferenco ĝis la 15ª de majo 2008!

Se Vi ne povas veni persone kaj ĉeesti la konferencon fizike — ni ege petas Vin *subteni* la konferencon per financa helpo kaj subvencii partoprenon de kiom eble pli da instruistoj kaj instrukapabligadon de junaj instruemuloj el Afriko per enpagoj al la konto de ILEI ĉe UEA (ilek-a) aŭ al Afrika Fondaĵo de UEA, ĉiam kun indiko „Benino 2008“. Sed pli bone plenigi **aliĝilon** en http://ilei.info/konferenco/alighilo2008.php kaj partopreni en la unua en historio granda internacia porinstruista E-aranĝo en Afriko. **Informoj** pri la konferenco, ĝia programo, urbo, partoprenkondiĉoj en http://www.ilei.info/novajxoj/Portonovo.php.




Se vi havas demandojn, proponojn aŭ komentojn — Vi ĉiam estas bonvena **skribi** al:

**Aida Čižikaitė** aidute@mail.lt (ILEI-estrarano pri konferencoj) kaj

**Charles Alofa** alofkarlo@yahoo.fr (prezidanto de LKK).

### Afriko de proksime —
### ĝia kulturo malfermiĝos tuj antaŭ Viaj okuloj!

**BONVENON, BONVENON, KARAJ GAEMIKOJ!**